


BULTENO DE

# Malaga Esperanto Grupo

# La Ĉenaĉero

n-ro 4 SEPTEMBRO - OKTOBRO Jaro 1984a

## NIA ENTREPRENO

Je la komenco de nova lernojaro, kutimas projekti novajn agadojn. Mi aplaŭdas tion kondiĉe ke oni plenumu la planoj kaj ke ĉi taŭgu. Ofte, preskaŭ neniu el la projektintoj kapablas imagi, ke la venontaj malhelpoj estos tiel imponaj ke ŝajnos nevenkeblaj al ili mem. Tamen, la posta realo konfirmas, foje, la malforton de iliaj hipotezoj kaj instigas iujn forlasi la batalon.

Kial okazas tiel? Se ni konsideras eĉ supreĵe la kialoj de iu ajn frakaso, ni konstatas, ke ili esta duoblaj, internaj kaj eksteraj. Domaĝe, ĉiam oni parolas pri la malfacilaĵoj fontantaj el la nemovadanoj dum fundamente nepras venki la problemojn devenantajn el ni mem ĉar evidentas, ke ni ne konvinkos aliajn se ni mem ne sentas plene kaj forte la idealon kiun ni predikas. Tial,kaj resume, la afero konsistas, ĉefe, el la bezono profundigi niajn konojn pri la Lingvo kaj la Movado. Tio estal tiel nepra ke, se ni preterpasas la respondajn studojn, neniam eblos sukcesi.

Do, legu multe en Esperanto kaj pri ĝi; cerbumu ofte pri niaj celoj, problemoj kaj atingaĵoj -internaciaj, naciaj,regio-

(Al la 3a paĝo)

# NIA GRUPO

Je la komenco de la monato Oktobro, ni kunvenis celante interkonsenti pri kelkaj administraj punktoj, pro kiuj nia grupo lastatempe lamis.

Interese estas por ĉiuj membroj koni ĉiajn pritraktitajn novaĵojn. Kaj, pro tio, ni aperigas la ĉefajn konkludojn:

1.- Pri la postenoj

Estas Prezidanto kaj Kasisto samideano Rafael López.

Estas Sekretariino samideanino Mª José Quesada. Estas Revuistinoj samideaninoj Mª Dolores Gaspar kaj Carmen Beltrán Fine, estas Bibliotekistoj gesamideanoj Esther Morillas kaj Enrique Hurtado de Mendoza.

Ĉi tio estas provizora distribucio kaj, fakte, se iu membr ne konsentas pri ĝi, tiu rajtas peti modifon.

2.- Pri membreco

Estas membroj ĉiuj, kiuj pagas siajn kotizojn (prefere akurate). Kompreneble, por esti membro, oni devas nur pagi la koncernan kotizon. Membroj rajtas ricevi nian bultenon senpage, rajtas voĉdoni okaze de ĝeneralaj kunvenoj kaj partoc preni kiun ajn aferon pri kiu okupiĝos la grupo.

3.- Pri revuo

La elektitaj respondeculinoj pri la revuo prizorgos ĝian komponon kaj ili ne estas devigataj redakti ĉiujn artikolojn. La partoprenontoj redaktu la artikolojn prefere tajpe. La revuo restos, kiel ĝis nun, dumonata.

4.- Pri kotizo

La kotizo plialtiĝos ĝis 150 ptoj ekde la venonta Januaro Ankaŭ ni enspezos monon per la uzado de la Biblioteko. Pri la utiligo de la mono, ni atendos ĝis la plialtiĝo de la kotizo dum la venonta jaro por konstati ĉu la grupa ekonomio glatiĝas aŭ ne.

Ni esperas ke ĉio ĉi plenumiĝos. Post unu jaro, ni bilanco nian agadon. Ĝis!

---

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

---

# LA MOVADO

KONKLUDOJ KAJ REZOLUCIOJ DE LA 2a AKE
(Daŭrigas)

4.- Pri Esperanto kaj lernejo
-Oni intencu enkonduki la Esperanta edukado en la lernejo.

5.- Pri Kunlaboro de A.E.U. kun I.L.E.I. pere de la Enkonduko de Esperanto lernejen
-Profito de la ebleco, kiun havigos al ni la registaroj andaluzaj kaj/aŭ hispanaj.
-I.L.E.I. pretigos intruistojn.
-Reciproka kunlaboro inter A.E.U.kaj I.L.E.I.

6.- Pri la venonta Kongresurbo
-La nova Kongresurbo estos Sevilo en la tagoj 15a-18a (ambaŭ inkluiditaj)en Aŭgusto, 1985.

7.- Pri ekzamenoj
-Ekzameniĝis tri personoj pri la elementa nivelo kaj sukcesis.

8.- En la venonta Kongreso, ni kantos la himnon du fojojn, dum la malfermo kaj dum la fermo.

9.- Pri la Estrara Kunveno
Ĝi okazos Malage la venontan 29an de Decembro kaj finiĝos la sekvantan tagon.

Mankis tempo por pritrakti ĉion intencitan. Memoru tamen, ke ne nur Kongreso estas taŭga momento aktivi por Esperanto, sed ĉiam. Ĉiukaze, nepras agemo por efektivigi ideojn en la realon; kaj sen tiaj agemo kaj afektivigo nia lingvo ne elirintus el la tirkesto de Zamenhof.

Sciigis Rikardo

---

(El la paĝo la)
naj kaj lokaj-, parolu kun aliaj personoj pri ĉio ĉi tio.

Cu vi konsentas? Kion vi faros?

Andrés Martín

---

# ILEI Paĝoj

GROSJEAN-MAUPIN (Daŭrigas)

Grosjean-Maupin kunlaboris kun aliaj aŭtoroj en la verkado de la Plena Vortaro de E-o kaj en:

"Cours Méthodique d'Esperanto" kun Aymonier.

"Cours elementaire pratique d'aprés la méthode combinée" (1909), tradukita italen, persen, ktp., kun Becker.

"Praktisches Esperanto Lehrbuch" (Berlín, 1909), kun Sprotte.

La ĉefa leksikologiisto de E-o tradukis "La formontinta amiko" (1921) de Thiebant, kaj kunlaboris en la Enciklopedio.

---

Edmond PRIVAT

Naskiĝis 17/8/89 kaj mortis 23/8/62. Franclingva sviso el Ĝenevo, apartenis al protestanta familio el Nimes (Francujo) kiu venis al Ĝenevo en la 16a jarcento. Post brilaj klasikaj studoj en Ĝenevo kaj universitataj en Parizo ĉe la Sorbono, Privat fariĝis doktoro pri Literaturo. Fidele al la famila kutimo instruadis la anglan lingvon kaj literaturon ĉe la Universitato de Neuchatel.

Lernis E-on en 1903. Fondis kun HODLER revueton: "JUNA ESPERANTISTO". En 1905 partoprenis la 1an Kongreson de Buljono kien li piede pilgrimis kaj kie parolis elokvente. En 1907-8 li faris longajn propagandajn vojaĝojn tra Usono, Anglujo kaj Francujo. En 1911, en Rusujo kaj Mez-Eŭropo. En 1912 fondis la Internacian Instituton de E-o Ĝenevo. De 1920 ĝis 1943 li redaktis la gazeton "Esperanto".

Privat prezidis internaciajn komitatojn kaj konferencojn pri la liberigo de la subpremitaj nacioj. De 1922 ĝis 1926 estis honore konsilanto kaj vicdelegito de Persujo. Pioniro de la popolklerigo kaj de la kooperativa sistemo en Svisio. De 1921 ĝis 1928 organizis kaj gvidis la internacian movadon. Li iniciatis la prezenton de E-o al la estinta Ligo de Nacioj en 1921 kaj tie li defendis elokvente nian aferon kiel delegito de la persa registaro. Malgraŭ la opozicio de la franca kaj brazila delegitaroj, la plena kunsido de la Ligo adoptis la gravan rapor-

ton de la organoj de la Ligo "L'Esperanto comme langue internationale auxiliaire", plej grava dokumento pri nia Movado, raporto tradukita en dekon da lingvoj.

Lia propagandista agado distingiĝas per absoluta seriozeco kaj konpetenco. Li prezentis E-on, krom la Ligo de Nacioj, ankaŭ al Internacia Laboroficejo kaj Universala Telegrafa Unuiĝo, iniciatis teknikajn konferencojn pri E-o en Lernejo -1922 Venezia, Radio -1924 Genevo, Komerco -1923 Venezia, Paco kaj lernejoj - Praha 1927, 1-a Somera Universitato-Genevo 1926.

Kiel oratoro estis unu el el plej eminentaj, klara kristale pura elparolo kaj komprenebla logika facila pensperado.

Lia verkado estas ampleksa kaj resume konsistas el:

"E. at a glace" kaj "E. in 50 lessons", ambaŭ en 1908.
"Karlo" (1910), populara legolibro.
"Kursa lernolibro" (1911), populara rekmetodo.
"Esprimo de sentoj en E-o", scienca, klara kaj ĝuebla.
"Historio de E-o" (unua parto 1911, dua parto 1927).
"Vivo de Zamenhof" (1920).
"Pri E-literaturo" (1911).
"Ginevra" (1913), versan dramo-legendon.
"Tra l'Silento".

"Liaj ĉiuspacaj verkoj, kiel jesas Szilagyi, respegulas el stila vidpunkto kristalan, puritanan klarecon, elegantecon kaj en la historiaj kaj beletristaj verkoj tiu stilo atingas la plej altaj regionoj de la E-literaturo."

Privat ankaŭ defendis Gandhi kiun li akompanis al Hindujo en 1931; en 1917 fondis internacian komitaton por sendependo de Pollando kaj de 1923 ĝis 1933 perzidis la I.C.K. (Internacia Centra Komitato) kiam dum la kongreso de Stockholm li ne estis reelektata en la Komitato de U.E.A. same kiel Stettler kaj Karsch,sekve de la komploto de Bastien kaj Petit.

ENGHOLM, Stellan

Popollerneja instruisto. Naskiĝis 1899 en Stockholm, mortis en 1960. Konatiĝis kun E-o en 1920 sed fariĝis aktiva esperantisto en 1927. Kunlaboranto de L.M. (Literatura Mondo), fama neŭtrala literatur-arta revuo el Budapesto. Li fariĝis populara per sia unua romano "AL TORENTO"(1930).

(Daŭrigota)

# LETEROJ AL LA DIREKTORO

Sinjoro Direktoro:

Kio okazas en nia grupo? Kio ne funkcias ene de ĝi? Ni jam organiziĝis. Kelkaj el niaj membroj respondecas pri la ĉefaj necesaĵoj (publikaj, kulturaj, propagandaj aspektoj, ktp.).

Sed krom tio, nia grupo ne agadas glate. Kial?

Ĉar ni ne deziras tute kompromitiĝi kun Esperanto kaj ĝia disvastigo.

Kial ni devas pagi altan monatkotizon por subteni niajn elspezojn se ni povas peti eblan subvencion de kelkaj ŝtataj organizaĵoj (ekzemple Urbodomo, Kulturdomo...)? Provante tion, ni perdas nenion kaj, almenaŭ, ili scios ke ni ekzistas.

Kial ni ne laboras ekster nia grupo se tiamaniere, ni plenumas samtempe du taskojn, tio estas, ni enspezas la tre bezonatan monon kaj ankaŭ ni disvastigas nian lingvon, nian Movadon kaj nian spiriton?

Eble nia kara samideanaro preferas resti komforte en sia hejmo kaj de ĉi tie lukti kaj peni por Esperanto inter siaj familianoj kaj siaj malsovaĝaj bestoj.

Sed nia laborejo troviĝas eksterdome. Ni ne devas esperantigi psitakojn. Kontraŭe, ni devas intenci esperantigi niajn samurbanojn. Tio ja ne estas facila. Sed ni neniam finos se neniam komencas.

Bonvolu disvolvigi tiujn bonajn ideojn, kiuj cirkulas inter niaj samideanoj kaj kiuj neniam plenumiĝas, ekzemple tiu pri la Esperanta Kurso por Infanoj, kaj la Esperanta Kurso en la Vegetaria Rondo kaj en la Prilingva Lernejo.

Tiuj, kiuj povas respondi almenaŭ unu el tiuj demandoj bonvole skribu nin respondante pere de la revuo.

Dankon por publikigi ĉi tiun leteron.

Rùperez kaj Nikima

Karaj Rùperez kaj Nikima, ni atendu ĝis la venonta numero aperos por vidi ĉu iu respondas al vi. Ni esperas ke vi baldaŭ trovos la petitajn respondojn.

La Direktoro

# JUNULARA ANGULO

## LA SENLABORECO KAJ LA STUDENTOJ
(Dua Parto)

Oni povas konstati ke en la jaro 1983a estis 551600 geuloj 20-24jaraj senlaboraj. Procento de ili estas gestudentoj.

Kiaj estas la eblaj solvoj? Estas malfacile klarigi tion. Oni povas paroli pri plimultigo de la kvanto da lernojaroj. Sed ĉi tio povas kaŭzi la forlasado de la studoj aŭ, plie, ke la gejunuloj decidas eĉ ne studi.

Alia solvo povus esti krei novajn laborpostenojn (ĉi tiu estas la plej logika solvo sed, samtempe, la plej malfacila se ni rigardas la realon,kiu ĉirkaŭas nin).

Eble bona solvo estus oferi alternativojn al la gejunuloj, tio estas, igi ilin studi tion, kion ili vere deziras aŭ bezonas por sia estonteco antaŭ ol ili studu ion devigitan aŭ faru nenion.

Resume, tiu problemo estas tre grava kaj ĝian solvon ni atingos nek facile, nek baldaŭ.

Sennaciulo

---

## 9a HEJS RENKONTIĜO 9a HEJS RENKONTIĜO

Malago estos la sidejo de la venonta 9a HEJS Kunveno, okazonta dum Pasko 1984. Ĉar ni ne povas disponigi tendumejon, ni petis helpon al la Kultura Asocio "Granda Frateco Universala", kiu, ĝentile, cedis al ni unu el siaj sidejoj en Malago por dormi kaj la alian por kunveni. Tio signifas ke la ĉeestontoj ne necesas kunporti tendojn sed nur litsakon. Tiamaniere, la Kunveno estos ankaŭ iom pli malmultekosta. La manĝado ne estos malfacilaĵo.

La venontan monaton Decembro okazos ĝenerala kunveno de HEJS dum kiu oni parolos pri ĉi tiuj aferoj. Ni informos pri la rezolucioj eble en nia venonta bulteno. Ankaŭ ni disdonos baldaŭ la koncernajn aliĝilojn.

Kaj momente neniom pli. Ĝis revido!

Rafael.

# SCIENCA PAĜO

## KVAZAROJ (Quasars)

Rafael López Castilla

Kiam en 1959 oni kompletigis la 3an Katalogon pri Radiostaciaj Fontoj de Radioondoj, observitaj per la radioteleskopo de Kembriĝo (Cambridge), Anglujo, neniu persono pensis ke, inter tiaj fontoj, kelkaj facile identigitaj kiel galaksioj (radiogalaksioj), troviĝis iuj, kiuj estis produktitaj de tute nova kaj nesuspektita universa objekto.

Unu el la plej studitaj estas tiu nomita 3C273 (tio signifas la objekton numero 273 de la 3a Katalogo pri radiofontoj de Cambridge). Rilate tiun 3C273, la plej brilantan korpon el sia speco, estis Cyril Hazard, en Aŭstralio, kiu sukcesis determini ĝian ekzaktan pozicion. La optika identigo signalis objekton, ŝajne stelan, praktike nevideblan okule, sed sufiĉe brilantan por mezgrandaj kaj grandaj teleskopoj. Ĉar estis la unuan fojon kiam la radiodissendo ŝajnis deveni el stelo, oni komencis paroli pri "radiosteloj". Per zorgaj mezuradoj, oni konstatis ke ĉi tiu stela objekto malproksimiĝis de ni po kvindek mil kilometroj sekunde. Alia simila objekto, ankaŭ identigita kvazaŭ stelo, 3C48, malproksimiĝis de ni po centdek mil kilometroj sekunde. Tiu rapido estas troa por steloj. Optika studado pruvis ke la morfologio de tiaj objektoj ne estas stela. Oni temis, do, pri nova kategorio de stelaĵoj, kaj pro ilia aspekto, ili ricevis la nomon de Quasars (Esperante, Kvazaroj), el la angla "QUASistellARS objects.

Kial ili montras tian rapidegon dum malproksimiĝo? La malproksimiĝo okazas precipe pro la rapido de ekspansio de la Universo. Kvazaroj estas ekstergalaksiaj objektoj, des pli malproksimaj ju pli grandas siaj rapidoj.

Oni jam trovis centojn da kvazaroj, el kiuj la plej malproksimaj havas rapidon kiu egalas 90 procentojn de la luma rapido.

Kvazaro kiu malproksimiĝas de ni per 270000 kilometroj sekunde troviĝas je distanco tiel ke sia lumo pasigas 15000 milionojn da jaroj por alveni al ni.

(Daŭrigota)

# Kunlaboraĵoj

PUZLO

Dum jaroj li sin dediĉis al ĝia solvado. Tio jam estis io li, ol simpla honorafero, scii, ĉu li kapablas venki senanimaon. Li ne konis la bildon disan de la puzlo; kiel li lertis unmeti la dissegitajn pecojn, eĉ li mem ne povis klarigi. Li renis puzleron kaj iel blinde, talpe, kun infinita pacienco, li erĉis ĝian lokon en la ĵiga tuto. Li ne tuj trovis la ĝustan kuŝejon, sed, haltinte ĉe ĝi, io, ia vibro lin diris, ke tiu m nuskla spaceto tie supre, apud la dekstra flanko, tute bonkore akceptos la gastigotan eron, kaj senhezite li delasis ĝin, kun la certo, ke ĝin li neniam plu devos retuŝi. Post tio li kaptis alian, kaj tiel senĉese, la puzloludo daŭris kaj daŭris senhalte. Antaŭ jararo li ekigis, kaj ofte li bezonis tagojn, monatojn eĉ plenajn jarojn por loki la pecon. Tio ne malkuraĝigis lin, lia persistemo kolosis nelacigeble. Li sen ia ombro da dubo sciis, ke iam li finos, kaj tiam li povos spekti la finitan bildon. Ĝis tiu momento li sidediĉe klopodadis fervore ĉe sia de li elektita tasko, pluigante la senfinan ludon, senlace, seninterrompe.

Kaj iam li preskaŭ atingis la finon. Fermokule li pretis loki la lastan pecon en la lastan liberan lokon per trema mano, kiun li tuj retiros de super la ĵigo. Li provis sin trankviligi, kvietigi la eksciton, la superban emociegon, kiu lin pose dadis. La mano kun la ero sobiĝis ale al la puzlo, li metontis la lastan pecon por formi puzlan bildon, sed li ne plu eltenis: li levis sen hezito la palpebrojn kaj per la du mire apertaj okuloj li rigardis la bildon: gelo senmovigis lin, la sango glaciiĝis en la vejnoj ĉe la ekvido. Sur la ĵiga surfaco aperis homo solvanta puzlon. Tuj solvonta, fakte, ĉar li metontis la lastan pecon por formi puzlan bildon, en kiu alia homo metontis la lastan pecon por formi puzlan bildon, en kiu alia homo metontis la lastan pecon por formi puzlan bildon, en kiu alia homo...

MAJSTROVERKO

De mia naskiĝo mi opiniis min perfekta. Ĉiuj miaj faroj, ĝis kiam mi memoras, sublimis plejeble altgrade. Eĉ miaj kompanoj

konsideris min la plej bona. Ĉiu el miaj elpensoj, ĉiu el miaj elpensaĵoj superis la antaŭan, tiele altigante la kvaliton de miaj majstroverkoj. Jes, ili ĉiuj estis majstroverkoj, perfektaj ĝis en la plej pita detalo, pripensitaj dum longegaj sendormaj noktoj, pesitaj kaj kribitaj por atingi la Plejan Bonaĵon. Kiomfoje mi rigardis ilin kun fierego! Kiel patro sian idon. Kun sento de memfido kaj ne supereblo. Mi ja konciis pri mia imagivo, pri mia kreivo. Mi kapablis je ĉio. Je ĉio! Guste tio pelis min iri novajn vojojn, esplori la neesploritan, eniĝi la neeniĝitan. Mi fidis mian povon ĉion venki kaj previdi. Ho! Kial mi ne pensis pri ebla eraro? Kial mi preteratentis tiomege gravan aferon? Nun nenio fareblas, ĉio egalas. Mi jam ne povas retroiri por rekomenci. Makulo sur mi, kiu neniam forviŝiĝos. Mi ne plu estas perfekta. Mi faris eraron, kiun mi pentos la tutan vivon: mi kreis la homon.

Francisko Ksavero Moleono

Egan dankon al nia samideano Ksarĉjo pro lia kunlaboro. Ni deziras al li grandan sukceson kaj novajn premiojn.

La Redakcio

---

ATENTU: En la venonta numero aperos recptoj pri vegetara kuirarto, el nia samideanino Franjo. Tia maniere, ni povos manĝi pli bone kaj sane. Ĝis la venonta numero, Franjo!

---

## VERSOJ

L'espero, l'obstino kaj la pacienco
jen estas la signoj per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro!

L. ZAMENHOF

Vi ŝuldas al mi ĉion pro miaj versoj, homo.
Mi al vi, ne. Mi faras mian laboron, pagas
per mia mon'por lito, por manĝo, por la domo,
por la surkorpa vesto, en kiu mi plu vagas.

ANTONIO MACHADO

# AMUZAĴOJ

**Russell kaj la Papo**

Iu filozofo miriĝis kiam Russell, fama matematikisto, diris al li ke iu malvera propozicio implicas kiu‸ajn propozicion. La filozofo diris: Ĉu vi diras ke el la esprimo "du plus du estas kvin" sekvas, ke vi estas la Papo? Russell respondis: Jes. La filozofo demandis: Ĉu vi povas pruvi tion? Russell respondis: Certe. Kaj li tuj elpensis la sekvantan demonstracion:

Supozu ke 2+2 = 5

Deprenante du de ambaŭ flankoj de la ekvacio ni atingas

2 = 3

Translokigu la numerojn kaj rezultos 3 = 2

Deprenu unu de ambaŭ flankoj kaj rezultos 2 = 1

Nu, la Papo kaj mi estas du. Ĉar 2 egalas al 1, tiam la Papo kaj mi estas unu. Do, mi estas la Papo.

SERĈU dek tri nomojnde aromaj herboj:

B E A F R A N J O O A R A F A E L O A S O R
E R E T I T A B L O C O K S A R Ĉ J O G F U
N B Ŝ A O N E R A M S O R S U P E R I E E K
R E U S M R O Ĝ I B O N O L I M O M A K S E
I J L E A E U B I G Ĉ A S T O M A T O V E T
K A U A K A N O M I L O R T E A U I E I T O
O T A N L E A T A L B O M D I G L A I S S Ĵ
B I I A N T R E O A U T O M O U I L O E E S
F M M H R I K A R D O H M J O S E F O T O S
M I E E I A J U N A N E T O N H L M B O Ĝ K
N A S J E A R O H S O N L L Ŝ Z A P Ĵ E U O
A N I U E S N J A Ĉ E E S T O Z A P E Ĝ E R
A O O F R E S L S T S O N F E K I I S M O Ŭ
N E N Ŭ R O O E N D U L E S F M I O Ĉ Ĵ A A
D A T A R L E T R O H O T E P I R R E M A L
R A M A F E O T E O A K S I F F O O S E B M
E S Ĉ I O S E B P J P N N S H A R O E A F A
O F I L I P O I M U J E N I P E R I Z F I L
T E I L P E T R O E L F I U L O J I V T L A
A S P A R A G O J O G F R O N F L L I K O Ĝ
J U L I O S E Z A M E T O G A I Ŝ E S E J O
F N O Ŝ T U I T O Ĉ T O O N O P E E I T Ĉ E

LITERA SUPO



Vi trovos la solvon en la venonta numero. Solvu ĝin! Ĝi estas tre facila.

Julio Verne, laŭ mi kaj mi ne petas ke ĉiuj subtenu la saman opinion, estas la plej granda aŭtoro, ne ĉar ne estu aliaj pli bonaj romanistoj, sed ĉar li estas la unua verkisto kiu atingas kapti la atenton de siaj tutaj legantoj. Pri la imagpovo de Julio Verne ĉio estas dirita, mi ĉi tie nur substrakos du aferojn kiuj igas lin speciala verkisto, unue ke li malgraŭ siaj verkoj neniam eliris el sia lando, kaj due ke li estis esperantisto, kio pruvas ĉion, kion mi diris pri sia inteliĝenteco, ĉu ne? Eĉ li estis honora prezidanto de la esperantisto-klubo de Bolougne-sur-Mer, t.e. la unua grupo kiu organizis Universalan Kongreson, okazita en 1905; bedaŭrinde Verne mortis nur kelkaj monatoj antaŭ ol la Kongreso. Same li komencis verki historion kie la ĉefroluIo estis esperantisto kaj li faris mondan vojaĝon kun mil kaj unu aventurojn kiuj ĉiam havis solvon dank'al la helpo de aliaj geesperantistoj tra la tuta mondo. Bedaŭrinde la morto ankaŭ venis antaŭ ol la fino de ĉi tiu libro.

Sed mi preferas diri ke li ne mortis, ĉar Julio Verne estis, estas kaj sendube estos tiu fidela amiko, tiu ne-videbla kunulo kiu malfermis por ni la pordojn de la aventuro kaj la imago; malgraŭ ĉio, eĉ la televido, Julio Verne kaj lia verkaro neniam mortos.

José María Rodríguez Hernández

Kordovo

———oooooOOOOooooo———

ANONCETOJ

Ne fuŝu! Kulturu vian esperantistecon per la Meza Kurso. La koncerna gvidilo nur kostas 300 pesetojn.

xxxxxxxxxxxxxxx

Partoprenu en la Movado aktive. Temas pri mirinda ŝanco por realigi vin mem.